
# BONA ESPERO



Cirkulero por amikoj, subtenantoj
kaj membroj de la "Subtenanta
asocio de Bona Espero"

n-ro 8 julio 1983

---

## Se ...

... - ja, se Bona Espero dependus de la ŝtato Goias, tiam ĝi nuntempe malbone aspektus.
Brazilo ne plu havas monon; ĉiukaze ne por lernejoj, instruistoj kaj ĉio simila. Ŝajnas, ke edukado tie ne ĝuas tiel altan valoron. Jam ekde oktobro 1982 Bona Espero ne plu ricevas nutraĵojn de la ŝtato. Feliĉe ni denove povas sendi iom da "forta" valuto al Brasîlia; ni ja ĉiam unue kolektas la monon ĉi tie sur nia konto en Münster kaj nur sendas, se ili bezonas ĝin. Nur tiel oni povas eviti la brazilan inflacion.

Sed intertempe ankaŭ la Bona Espero-enloĝantoj havis ideon kiel malŝarĝi la budĝeton. De nelonge ili nun aktivas en la

## Plenkreskula klerigado.

Eble tio baldaŭ fariĝos firma instituc̣io en la farmo. Preskaŭ 50 personoj partoprenis la seminarion dum la paskaj tagoj. Sub la temo: "kiel korekte informi pri Esperanto?" oni vigle diskutis. Vigliĝis ankaŭ Ursula [illegible]attapaglia, kiu staris kune kun la ses knabinoj 18 (dek-ok!) horojn en la kuirejo. Antaŭe ili planis tiel, ke ĉiu partoprenanto kunportu iom por manĝi aŭ i n alian bezonatan. Sed kvankam ili tre abunde kuiris, multe de la kunportitaj manĝaĵoj restis.

Por ne troigi la seriozan laboron oni ankaŭ zorgis pri ripozado: dum la paska nokto ili organizis grandan fajron sur la ludkampo. Tie oni gitarludis, kantis kaj dancis.
Tiel la seminario tamen ricevis iom da festa karaktero.

Granda parto de la kunportitaj nutraĵoj ankoraŭ troviĝas en la provizejo de Bona Espero - kiel bela rekompenso por laborplena semajnfino, de kiu verŝajne ĉiu partoprenanto iom profitis! Vi ankaŭ povas imagi, kiel oportune estis ricevi tiom da aĵoj rekte en la domon, ĉar ili ja ĉiam havas transportproblemojn.

## Ĉu vi eble havas tro multe da libroj?

La demando estas iom maldiskreta; sed ni nur demandas, ĉar la loĝantoj de Bona Espero decidis pli akcenti la esperantistan karakteron de la farmo. Pro tio la biblioteko, kiu ĝis nun konsistas el ses plenaj ŝrankoj, devas esti pligrandigita. Kompreneble tiu programo kostu plejeble malmulte da mono. Do, se vi havas iom tro da Esperanto-libroj (eble vi havas kelkajn duoblaĵojn), tiam simple enpaku ilin en vian venontan Brazilo-paketon.

## Ni denove kunsidos!

Ĉiujn membrojn kaj subtenantojn ni oficiale invitas per tiu ĉi cirkulero al nia jarĉefkunveno la 25-an de aŭgusto 1983.

Loko: Klubejo de la fervojista sociala organizo, Münster, Hamburger Tunnel 2.

Ankoraŭ unu noto: estas elektoj ĉijare!

Pri multnombra partopreno ni - kiel kutime - tre ĝojus!

---

respondecas: Barbara Brandenburg, Dt. Botschaft Bagdad, Postfach 1500, 5300 Bonn 1. Kontoj de Bona Espero e. V., Schmittingheide 17d, D-4400 Münster: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60, kto.-n-ro: 900 826 'Bona Espero' --- Postscheckamt Dortmund kto.-n-ro: 2033-99-465.